Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 9-an de januaro 2025 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo.** La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 21-an de novembro 2024**
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

**3. Asisto al Douglas**
Ni konstatas, ke Statsforvalteren nomumis oficialan kuratoron por Douglas.

**4. Esperantonia**
Venis letero de triopa grupo de verkistoj/ilustristoj/literaturistoj, kiuj interesiĝas pri parta luo de Esperantonia laborcele. La estraro pozitive rigardas al tiu ideo. Tia luigo donus ne nur enspezojn, kiuj konsiderinde helpus kovri la nuntempajn ĉiujarajn deficitojn de NEL, sed ankaŭ pli oftan ĉeeston de homoj en Esperantonia. Ni iniciatos retkunvenojn 1) kun la aktivuloj de la klubo de Oslo por diskuti la proponon kaj 2) kun la verkistoj por priparoli la kondiĉojn de eventuala lukontrakto.

**5. Kursoj**
Ni aranĝu novan 8-semajnan kurson pri Esperanto por komencantoj. Marianne instruos. Bård prizorgos la anoncojn en Facebook. Krome daŭre okazu la kurso por progresantoj, kiujn nun gravus pli aktive inkludi en la internacian Esperanto-komunumon.

**6. Norvega Esperantisto kaj Nacia Biblioteko**
La Nacia Biblioteko ankoraŭ ne fintraktis la peton de NEL pri Norvega Esperantisto. Ni prokrastas pluan decidon pri niaflankaj agoj ĝis la venonta estrarkunsido.

**7. Jarraporto 2023** – prokrastita

**8. Jarraporto 2024** – prokrastita

**9. Landa kunveno 2025**
La landa kunveno okazu unu vesperon, la 5-an de junio je 18.30. Ni plu diskutu eventualan kulturan programeron post la formala kunveno.

**10. Biblioteko kaj librovendado** – prokrastita

**11. Retpaĝoj** – prokrastita

**12. Eventualaĵoj**

Indas pripensi peton al legaco Uhlen por informagado pri Esperanto en ĵurnaloj.

**13. Venonta estrara interkonsiliĝo**

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaŭdon la 6-an de februaro 2025 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund